§ Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 3 2021

## ISRAELA TRIBUNALO ORDONAS REVENIGI INFANON EN ITALION

La pasintan 12an de novembro, Tribunalo de la urbo Telavivo en Israelo, ordonis, ke la sesjaraĝa infano Eitan Biran devas reveni en Italion kun siaj familianoj. La etulo supervivis tragikan akcidenton de aertelfero en la norditala urbo Stressa, la pasintan monaton majon.



14 homoj pereis en la akcidento de la aertelfero

Post la akcidento, lia patrina avo forportis la infanon en Israelon, komenciĝis tiam jura batalo inter li kaj la ceteraj italaj familianoj cele la leĝan zorgadon de la infano.

La italaj aŭtoritatuloj deklaris, ke pri la zorgado de Eitan respondeciĝos onklino loĝanta en Italio, tamen la patrina avo, kontraŭ-leĝe, forportis lin en Israelon. Tiam la avo apelaciis antaŭ israela tribunalo por atingi la leĝan zorgadon de la infano.

La juĝo de la israela tribunalo rifuzas la peton de la avo. La juĝisto proklamis en la juĝo: *"Oni povas kompreni la aflikton de la avo, tamen ne ekzistas alia opcio ol rifuzi la apelacion. Do, ni ordonas, ke la infano estu resendita en Italion antaŭ ol 15 tagoj"*. Malgraŭ tio, la avo povas apelacii antaŭ la Supera Tribunalo.

Antaŭe la italaj aŭtoritatuloj diskonigis internacian peton por aresti la avon, ĉar ili konsideris, ke la infano estis forrabita de la avo en Italio kaj poste ili vojaĝis en Israelon.

La infano perdis siajn gepatrojn, fraton kaj du praavojn kiam la aertelfero, per kiu ili ĉiuj vojaĝis, defaliĝis en la regiono Stressa. Dek kvar homoj pereis en la akcidento. Tri homoj estas arestitaj, sub la akuzo, ke ili volonte malfunkciigis la kriz-okazan bremson de la aertelfero, ĉar ties riparo provokus la ne-funkciadon de la aparato dum kelkaj tagoj.

# Vorto de la Semajno

**Abĵuri** (tr): Malagnoski per juĝa decido.

- *La Inkvizicio kondamnis al Galileo Galilei abĵuri siajn opiniojn la 22an de junio de 1633.*

- *La akuzito rajtis elekti, ĉu ricevi la punon aŭ abĵuri siajn ideojn.*



*"Galileo Galilei antaŭ la Inkvizicio"* de Joseph N. Robert Fleury

**ALIĜU AL INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO**

*Kiu rajtas esti membro de IJEA?*

• Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.

• Membro-studento: devas studi por licenciiĝo pri Juro.

• Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.

• Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

**Kotizoj.** La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭroj. Membro-studentoj aŭ membro staĝantoj pagas neniom. Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la Jarlibro de UEA). Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto. Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al ni.